

kelkaj lokoj okazis grupaj sinmortigoj truditaj de japanaj soldatoj.

La 23an de junio 1945 la batalo de Okinavo oficiale finiĝis, sed sinmortigita generalo Uŝijima ordonis, ke la soldatoj plu batalu, tial dum la sekvantaj du monatoj plu daŭris bataloj en la insulo.

Dum la Okinava Batalo mortis kvarono de la okinavaj loĝantoj.

La 23a de junio estas memortago de tiu Okinava Batalo. En la Pacmemorparko sur la monteto Mabuni



en la urbo Itoman kolektiĝas multaj homoj antaŭ la monumento Iŝiji por preĝi por siaj familianoj mortintaj en la batalo. Sur la monumento estis gravuritaj nomoj de ĉiuj mortintoj, ne nur japanaj sed ankaŭ eksterlandaj.

La nombro de la gravuritoj estas 242.225 ĝis la 23a de junio 2024.

Nun la monda situacio serioziĝas. Japanio preparas sin kontraŭ eblaj konfliktoj al la sudaj insuloj, nove konstruigante la militbazojn kaj deplojante trupojn sur tiuj insuloj. Multaj timas, ke samo okazos sur la insuloj kiel okazis tie fine de la dua mondmilito kaj ke denove okinavoj iĝos viktimoj. La guberniestro de Okinavo Tamaki Deny jene parolis:

Ĉu la nuna intenco de la registaro vere konsolas la animon de la viktimoj de la okinava milito? 70% de la usonaj militbazoj en Japanio troviĝas en la malgranda insularo de Okinavo kaj la registaro plu antaŭenirigas la konstruadon de la aerdomo Henoko. Mi proponas al la registaro reduktadon de la militbazoj en Okinavo kaj rezigno de la konstruado de la aerdomo. Mi plu kolpodas por establi eternan pacon en la mondo.



En la funebra ceremonio por la mortintoj de la batalo de Okinavo okazinta la 23-an de junio en Pacmemorparko en la urbo Itoman, gubernio Okinavo, Nakama Juusuke (18-jara) en la tria lernoĵaro de la Supera Mezlernejo Mijako en la urbo Mijako voĉlegis sian poemon de paco. La titolo estas “Ekde nun”.

Ekde nun deklamita de Nakama Juusuke (18-jara)

Ĉu ili scias pri sia mallonga vivo aŭ ne?

La cikadoj laŭte kantas.

En iliaj krioj, kiuj ne konas vintron,
mi denove rigardis supren al la ĉielo.

De tiu tago jam pasis 79 jaroj.

Mi fariĝis 18-jara ĉi-jare,

kaj miaj geavoj naskiĝis post la milito.

Tiom da jaroj pasis.

Tiun tagon geknaboj kun granda estontco,

neniel antaŭvidinte, ke ilia vivo estas mallonga,
mortis en la milito, kiun iuj komencis.

Karaj homoj subite

en la milito, kiun iuj komencis,
malaperis komence de la somero.

Iuj devis mortigi sian plorantan infanon.

Iuj familioj devis tute pere.

En la milito, kiun iuj komencis,

la ĉiamverda insulo perdis sian koloron.

Por kies milito ĝi estis?

Volo renkontiĝi, volo reveni hejmen,

volo paroli, volo ridi,

kiom ajn fojojn tiuj voloĵ ripetiĝis,

la milito, kiun iuj komencis,

rabis de ĉiuj ĉiajn volojn.

Mi perfekte komprenis,
ke la mallumego estas kromefiko de tiu milito.
En la fundo de la fundo,
kiun eĉ la plej malforta lumo ne povis atingi,
kie eĉ ne troviĝis malespero,
kie eĉ ne plu povis ekzisti kolero kaj ĉagreno,
homoj strebis plu vivi,
kaj ili kreis la hodiaŭon,
altiris la hodiaŭon,
ankaŭ la vivon de miaj gepatroj,
ankaŭ la vivon de mi,
ankaŭ la vivon de miaj amikoj,
ankaŭ la vivon de miaj karuloj,
kaj ĉion.

Mi perfekte komprenis,
ke la kromefiko de la milito
fermigis al la homoj la buŝon,
kvazaŭ malpermesi al ili eldiri,
ke tiu milito estas malbona.
Tia tragedio, kian ili ne volas rememori,
igis ilin tiaj.

Mi denove rigardis supren al la ĉielo.
La bluan ĉielon aviadilo transiras.
Por mi ĝi ne estas timinda.

Ni ne konas teruron de bomboj,
 kiuj faladis kiel pluvegoj,
Ni eĉ ne konas la literojn "mi" de la vorto "milito",
 sed mi konas la ĉiamverdan pacon.
Ankaŭ tiun tagon la maro estas blua,
 ankaŭ la suno brilis.
Mi scias la teruron,
 ke en tia ĉiutaga vivo povos ekmanĉi paco.

Ĉar homoj ripetas erarojn,
 ĉar tempo pasas senkompate,
ĝis hodiaŭ homoj preĝadis por eterna paco.
La tro grandan malĝojon,
 kiu okazis sur la malgranda insulo,
 homoj tenadis kaj heredadis
 man-en-mane.

Tamen la mondo ankoraŭ ripetas erarojn.
Se la preĝado de 79 jaroj ne sufiĉas,
 se la mondo ankoraŭ ne ŝanĝiĝas,
 ni daŭre preĝadu kune,
 por eterna paco
 por ni mem,
 kredante, ke tiele teksita paco iam savos la mondon.

Ankaŭ hodiaŭ, la 23an de junio,
 mi vivas por paco.
Tion mi ĝuas plenkore.

「これから」

仲間友佑（宮古高校 3 年生、18 歳）

短い命を知ってか知らずか
蝉が懸命に鳴いている
冬を知らない叫びの中で
僕はまた天を仰いだ

あの日から七十九年の月日が
流れたという
今年十八になった僕の
祖父母も戦後生まれだ
それだけの時が
流れたというのに

あの日
短い命を知るはずもなく
少年少女たちは
誰かが始めた争いで
大きな未来とともに散って逝った
大切な人は突然
誰かが始めた争いで
夏の初めにいなくなった
泣く我が子を殺すしかなかった
一家で死ぬしかなかった
誰かが始めた争いで
常緑の島は色を失くした
誰のための誰の戦争なのだろう
会いたい、帰りたい
話したい、笑いたい
そういくら繰り返そうと
誰かが始めた争いが
そのすべてを奪い去る

心に落ちた
暗い暗い闇はあの戦争の副作用だ
微かな光さえも届かぬような
絶望すらもないような
怒りも嘆きも失くしてしまいそうな
深い深い奥底で
懸命に生きてくれた人々が
今日を創った
今日を繋ぎ留めた
両親の命も
僕の命も
友の命も
大切な君の命も
すべて

心に落ちた
あの戦争の副作用は
人々の口を固く閉ざした
まるで戦争が悪いことだと
言っではいけないのだと
口止めするように
思い出したくもないほどの
あの惨劇がそうさせた

僕は再び天を仰いだ
抜けるような青空を
飛行機が横切る
僕にとってあれは
恐れおののくものではない
僕らは雨のように打ちつける
爆弾の怖さも
戦争の「せ」の字も知らない

けれど、常緑の平和を知っている
あの日も
海は青く
同じように太陽が照りつけていた
そういう普遍の中にただ
平和が欠けることの怖さを
僕たちは知っている

人は過ちを繰り返すから
時は無情にも流れていくから
今日まで人々は
恒久の平和を祈り続けた
小さな島で起きた
あまりに大きすぎる悲しみを
手を繋ぐように
受け継いできた

それでも世界はまだ繰り返してる
七十九年の祈りでさえも
まだ足りないというのなら
それでも変わらないというのなら
もっともっとこれからも
僕らが祈りを繋ぎ続けよう
限りない平和のために
僕ら自身のために
紡ぐ平和が
いつか世界のためになる
そう信じて

今年もこの六月二十三日を
平和のために生きている
その素晴らしさを嘯みしめながら